HELECO organo de Astura Esperanto - Asocio

n-ro 44 (3) MAJO - JUNIO/85

ESTRARO DE A. E. A.

Prezidanto: S-ro Santiago Mulas
Vicprezidanto: S-ro Adonis González
Sekretario: S-ro Luis Muñiz
Kontisto: S-ro Manuel Fernández
Kasisto: S-ro Ildefonso Domínguez
Bibliotekisto: S-ro Julio Argüelles
Gekomitatanoj: F-ino Pilar Alonso
S-ro Gervasio Colunga
S-ro José Ordieres
S-ro Faustino Castaño
S-ro Antonio Román

ADRESO DE A. E. A.

Str. Enrique Cangas, 25
Telefono, 341913 GIJON - 6

- - - - - - - - -

ENHAVO

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de A.E.A. Pri la artikoloj do, respondecas la aŭtoroj mem.
Depósito legal n-ro O/319/85

SPECIALA ENKONDUKO

Hodiaŭ Ni deziras enkonduki nian organon per memorigo.

Tio estas, Ni memorigas Vin pri tio, ke Ni regule sendas HELECO-n, krom al la gemembroj de nia Asocio, ankaŭ al diversaj Esperanto-Asocioj kaj -Grupoj.

Ni supozas, ke ĉiuj ricevantoj volonte akceptas nian modestan bultenon kaj eĉ eble ĝin frandas. Sed iomete ŝokas Nin: Kial oni ne samĝentile sendas al Ni ties bultenojn?, ĉar Ni opinias ke certe plejmulto el tiuj Asocioj kaj Grupoj, al kiuj Ni sendas HELECO-n, ankaŭ siavice eldonas ian "informilon" Ni vere ĝojos ricevante tiajn "informilojn" ne nur pro la nedubeble praktika fakto, ke tiele oni ja pliriĉigos Nian bibliotekon kaj konsistigos gravan helpon por Nia plifortiĝo en la regado de Esperanto; sed ankaŭ pro tio, ke tiaj "informiloj" nedubeble laborigos Nian "Verda Komisarejo"-n kaj tiel pliriĉigos la enhavon de HELECO!

= 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0

Nun kaj tial ke la hodiaŭan enkondukon Ni titolas "SPECIALA", bonvolu noti la kontentigan fakton ke, finfine!, Ni sukcesis ĝisdatigi la aperadon de HELECO, kio ja ankaŭ konsistigas veran specialaĵon, kvankam kompreneble Ni tute ne kuraĝas garantii tian ĝisdatigon, ĉar Ni ne povas promesi "regulan aperadon".

Ĉu komprenite?!

Do, Ĝis la venonta numero!

ADONIS.-


NIA ANTENO

Vi jam scias, nedubeble, ke la plantoj floras en printempo. Nu, en printempo ĉe Ni, kutime ĉiu-jare, ankaŭ floras la novbakitaj gesamideanoj, kiujn oni dum la ĵus finiĝanta lernojaro zorge bredis por la Movado instruante ilin pri nia kara Lingvo Internacia Esperanto.


Do, en Majo okazis ekzameno en la nova Grupo en Avilés, kiun sukcese trapasis la plejmulto el la tieaj gelernantoj de Esperanto. Kelkaj el tiuj gelernantoj jam komencis konstati la gravan utilon de Esperanto per interesa kaj vigla interkorespondado kun gesamideanoj el foraj landoj tiele grave kontribuante al pligrandigo de nia "Granda Rondo Familia".

En la 24-a de tiu sama monato ankaŭ en Nia sidejo Ni aranĝis la koncernan ekzamenon al kiu Ni submetis la gelernantojn de la Komenca E-Kurso disvolviĝinta en la klasĉambroj de Nia Asocio. Kaj la rezulto de tiu ekzameno ankaŭ estis sukcesa kaj kontentiga ĉar ĉiuj gelernantoj atingis la gradon "Kapabla Esperantisto".

En la 5-a de Junio Ni aranĝis etan ceremoniom por disdoni diplomojn al la sukcesintoj (kiuj cetere estis ĉiuj!), kiuj atestas pri ilia sukceso. Antaŭ ol la oficiala disdonado de la diplomoj, Nia aktivema kaj senlaca samideano Julio Argüelles projekciis filmetojn pri Universalaj Kongresoj, kiujn li partoprenis, per kiuj la ĵus bakitaj samideanoj des pli entuziasmiĝis pri Esperanto.



La periodo 1984/1985 de "Merkaplana" kiel Vintra Por-Infana Salono jam finiĝis kaj, sekve, kompreneble Ni jam ne deĵoras tie en la stando ESPERANTO, kio cetere estas okazo por Niaj "ĉiamaj sinoferantoj" iom ripozi el la kelkafoje iom ĝenpeza deĵorado.



Sed, kvazaŭ kiel kompenso pro la portempa perdo de Nia stando en "Merkaplana", oni jam ekde la 1-a. de Junio flirtigis Nian Flagon en la Bromenejo ĉirkaŭstranda de nia urbo.



La verda komisarejo



OFICIALA KOMUNIKO

La lingvopolicanoj de la taĉmento "ZAMENHOF" lastatempe arestis la lingvoteroristojn, kies cirkonstancaron oni povas vidi ĉi sube.

DISTRIKTO DE "HELECO", n-ro 43(2)

La t.n. KUTIMAJ kaj KUNLABORAĴOJ, kiuj kontraŭleĝe deĵoras kun la finaĵo "n" en la linio 22ª de la 2ª kolumno de la paĝo 1.

La t.n. OKCIDENTE, kiu agas same en la 7ª linio de la paĝo 2.

La t.n. FIŜTRANĈAĴOJ, kiu deĵoras en la 9ª linio de la paĝo 11 sen la tie deviga finaĵo "n".

DISTRIKTO DE LA JUBILEA AGADPLANO DE "HEF"

La t.n. KUN, kiu per tute nenecesa ĉeesto en la linio 7ª de la paĝo 1 malpermesas al S-ro RESPONDECULOJ uzi la devigan finaĵon "n".

La t.n. DIVIDITA, kiu deĵoras en la 12ª linio de la sama paĝo sen la deviga finaĵo "n".

La t.n. NOME, kiu uzurpas la oficon de la grupo EN LA NOMO en la sama paĝo, linio 20ª.

La t.n. UNUOPOLAJ, kiu uzurpas la metion de S-ro UNUOPAJ en la linioj 7ª kaj 8ª de la paĝo 2.

La t.n. PLURAJ kaj PUNKTOJ, kiuj ĉeestas en la 21ª linio de la sama paĝo sen la deviga finaĵo "n".

La t.n. RESPONDI, kiu uzurpas la profesion de S-ro RESPONDU en la sama paĝo, 22ª linio.

La t.n. OPORTUNE, kiu uzurpas la rolon de S-ino OPORTUNA en la 10ª linio de la paĝo 3.

La t.n. RESPONDECULO, kiu aŭdacas aperi sen la deviga finaĵo "n" en la 10ª kaj 11ª linioj de la sama paĝo.

La t.n. INTENCAS, kiu uzurpas la postenon de la grupo CELAS AL TIO en la 12ª linio de la paĝo 4.

La t.n. JE, kiu ne kapablis klarigi, kion li faras en la samaj linio kaj paĝo.

La t.n. POVUS, kiu uzurpas la lokon de sia parenco POVU en la 13ª linio de la sama paĝo.

La t.n. DUM kaj PASKE, kiuj uzurpas la oficon de sia filo DUMPASKE en la 16ª kaj 17ª linioj de la sama paĝo.

La t.n. KE, kiu uzurpas la profesion de S-ro KIU en la 18ª linio de la sama paĝo.

La t.n. JUBILETON, kiu uzurpas la metion de S-ro JUBILEON en la 18ª linio de la paĝo 5.

La t.n. ESTOS, kiu rifuzis esti antaŭita de S-ro ĜI en la 12ª linio de la paĝo 7.

La t.n. PO, kiu uzurpas la rolon de S-ro DE en la 5ª linio de

la paĝo 8.

La t.n. PRO, kiu uzurpas la postenon de S-ro POR en la 15ª linio de la sama paĝo.

Doninte al ĉiuj po kvin batojn per la kvin pintoj de la verda stelo sur iliajn vertojn, tiuj lingvodeliktuloj estis tuj liberigitaj.

Esperburgo, la 3-an de Junio 1985

LA ĈEFKOMISARO,

Al. Zibjades.

FILMOJ

La modo, la progreso, la tekniko, alportas al ĉiu faceto de la vivo novajn sistemojn de laboro kaj de temoj por ampleksigi la konojn kaj la civilizacion. La kinarto ricevis grandan impulson de tiu specifa tekniko, kiu revolucias la sistemojn de filmado. Siavice la kinarto kaj ŝiaj geniuloj donas al la homaro grandegan libron, en kiu oni povas legi pri multaj kaj diversaj temoj, kiuj principe devus riĉigi nian menson, nian scion. Kaj jen la problemo, multaj el tiuj filmoj diverstemaj, ne ĉiam estas taŭgaj por la edukado de la homo, eĉ plej grave, en multaj okazoj ŝajnas kvazaŭ la filmoj havus la taskon putrigi la homan mensan kapablon, tio evidentiĝas, se vi iomete analizas la nunajn filmojn, jen en via televidaparato, jen en la publikaj kinejoj. La sepa arto, en iuj aspektoj, venis al limoj ne plu tolereblaj, en iuj okazoj. Ili ne estas filmoj por edukado aŭ distriĝo de la spektanto, ili ja ne estas filmoj, kiuj instigas la homojn plialtigi sian kulturon. La nunaj filmoj, multaj el ili, celas la malbonon, kio ja estas palpebla realo pro ilia enhavo kaj mesaĝo.

La precipa fonto, kiu ŝprucas filmaĉojn, estas Usono. Tio jam estas io ne diskutebla. Inteligente kaj lerte agadas tiuj usonaj entreprenoj por plenigi la mondon per tiuj fifilmoj, kun speciala mencio de tiuj modernaj, nomataj "videoj". La krimoj, perfidoj kaj murdado estas la ĉefaj ingrediencoj de ĉiu filmo. Mortigi ok aŭ dek homojn en ĉiu filmo estas la kerno kaj mesaĝo de la nova usona filma entreprenaro. Ĉiam aperas iu ĉiopova sinjoro, malvenkebla, kiu pafas dekstren -maldekstren ĉiam trafe, sed mirakle li neniam estas tuŝita, ĝi estas la adoro kaj omaĝo al la perforto. Bona lernejo estas tiuj filmoj, kaj fakte, bedaŭre, ili havas multajn lernantojn. La junuloj entuziasmiĝas spektante tiujn filmojn. La veneno estas servita kaj iom post iom kancerigos la blankan menson de la junuloj kaj eĉ tiujn de la pliaĝuloj. Estas fakto, ke kiam sabate la televido prezentas iun el tiuj priparolitaj filmoj, la sekvantan tagon, la krimoj, ŝteloj kaj eĉ mortigoj plimultiĝas, jes tiom granda estas la influo de tiuj filmoj sur nia -socio. Sed malgraŭ tiuj konstatitaj faktoj, daŭre oni enprogramigas filmojn tiajn, eĉ longajn seriojn aperas en niaj diversaj televidoelsendejoj de tiuj menciitaj fifamaj filmoj. La revolvero estas la decidiga leĝo. Ŝajnas, kvazaŭ la uesto translokiĝis al la grandaj urboj. Akompanas tiujn filmojn, kies juveloj, estas la perforto, ĉiam belaj virinoj pretaj al seksumado, kaj pretaj ĉion fari por atingi monon kaj sukceson. Ĝi estas la skandalo de la vivo en Usono. Jes, jes estas la leĝo, kiu ĉiam venkas, aŭ preskaŭ ĉiam. Sed ne estas la leĝo la fundamento sur kiu baziĝas tiuj filmoj. La leĝo aŭ la venko de la leĝo aperas kiel komplemento de la tuto el kio konsistas la filmo.

Ankaŭ meritas mencion tiuj "videoj" pri muzikaj ensembloj: kadavroj, pugnobatoj, murdoj, strangaj gestoj kaj multaj aliaj malfacile klarigeblaj ornamaĵoj akompanas tiujn "videojn", en ilia prezentado. Estas vero, ke la tekniko ege progresis. Estas admirinda la miksaĵo de lumoj, ĝi estas io nova kaj bona, kondiĉe, ke tiu progreso estos

uzata racie kaj normale, sen difektigi la vidadon de la spektanto.

Sendube apartan komentarion oni devas dediĉi al tiuj seksaj "videoj", kiuj speciale oni spektas en amikaj rondoj, aŭ, vi miru! en familio!, ĉar laŭ mia modesta opinio, ne estas samaj la seksaj rilatoj inter viro kaj virino kaj la degenero, kiun evidentigas tiuj filmoj. Se vi posttagmeze rigardis filmon pri perforto kaj nokte oni prezentas familie pornografian filmon, la spektaklo de la tago fariĝas kompleta. Ĉio tio celas la putrigon de la homo. Ĝi estas la dekadenco de nia socio, de la homaj kaj etikaj valoroj. Ĝi estas ankaŭ la perdo de nia libero ĉar ni fariĝas sklavoj de tiu absurda modernismo, kiu minacas nian ekzistadon, kiel racia homa raso. Oni povas ĝui plene la vivon sen neceso de tiuj nerekomendindaj lecionoj, kiujn oni povas eltiri de tiuj filmoj. Estas vero, ke ekzistas multaj protestoj rilate al tiuj filmaĉoj, sed vane; daŭre oni enprogramigas ilin; do, nur restas al vi du elektoj, aŭ vi rigardas tiujn filmojn aŭ vi silentigas la televidaparaton.

Evidente ni devas konstati, ke tiuj entreprenoj usonaj, kiuj sin dediĉas al tiu negoco estas ege lertaj por disvendado de siaj produktoj, kaj ni estas tiom stultaj, ke ilin aĉetas, kvazaŭ ili estus terpomoj (kun pardonpeto al la terpomoj). Nu, ĝis kiam daŭros ĉi tiu situacio ? Kiam oni prezentos al ni interesajn kaj edukajn filmojn ? Estas vero, ke ankaŭ estas filmoserioj rigardindaj kaj ege instruaj, sed ili ne estas usonaj, precipe tiuj serioj venas el Anglujo. Vole aŭ ne vole prezentiĝas antaŭ ni la demando, kial en Usono oni realigas tiujn filmojn ?, ĉu ili estas simple, vidpunktoj de avaraj usonaj negocistoj, aŭ tiuj filmoj estas specimenoj de la tiea socia vivo? Mi pensas, ke ne; sed se jes, Usono ankaŭ estas la lando de la infero.

LUIS SERRANO PEREZ

(SABADELL)

A N O N C E T O

De la 1ª ĝis la 6ª de Julio 1985 en la Eŭropa Vilaĝo de LE POUGET (Lozére) 2Km el VILLEFORT - fervoja linio PARIS - NIMES

PIEDMIGRADO ESPERANTO

En la kadro de la "CHEMINS" Asocio

Ekde aŭtentika vilaĝo el granito ni piedmigrados stelvoje tra la Lozére montaro, laŭirante la Rigordone, ktp. Tiu piedmigrado sin turnas al esperantistoj kaj neesperantistoj. Por la neesperantistoj, okaze de tiuj plezuraj marŝadoj, ni inicos pri Esperanto.
LA EŬROPA VILAĜO de LE POUGET (Asocio leĝo 1901) estis kreita en 1965. Ĝia celo: organizi internaciajn renkontiĝojn okaze de propravolaj laborejoj por gejunuloj (koforman renovigon de la vilaĝo de LE POUGET).
Tiu vilaĝeto konsistas el malnovaj farmdomoj kun ŝtonplataj tegmentoj, ĝi situas ĉe la linio de Lozére, de la Gard kaj de la Ardéche, meze de la nacia parko de Cévennes.
Krom la laborejoj, okazas aliaj aktivaĵoj:

-Restadoj kun temoj, seminarioj, pripensadaj temoj, lernejaj vojaĝoj, naturstudado klasoj, formadaj restadoj pri medio, metiistaj staĝoj, k.t.p.
Por pli da informoj, skribu al:

Ginette GABILLON
32, rue Renault
33200 BORDEAUX CAUDERAN (FRANCE)

M I A P E N S O

Kajte fluganta en la vento
kiel sagaca diableto
reiras ridante, trankvile
por ĉiam al vi... mia penso.

...Netraireblajn homajn murojn
preterpasas ĉiumomente,
ne ripozas, kuras silente,
baraktas kontraŭ la klaĉmurmurojn

PETRO ULLATE

DIVERSAJ TEMOJ

LA NOBELPREMIO

La lastan nobelpremion (11), pri Literaturo oni aljuĝis al la ĉeĥoslovaka verkisto Jaroslav Seifert (12), kiu, tial ke li malbonfartas ankoraŭ, ne decidiĝis iri en Stokholmon por ricevi la premion, kies valoro estas dek milionoj da pesetoj.

Lia verkaro, je la komenco de marksista tendenco baldaŭ estis influita de la franca modernismo. Je la dudek jaroj li aperigis sian unuan libron, "Urbo en Larmoj". La jarojn dudek li aperigis "Amo Sama" kaj "En la Cumbroj" per kiuj, li kantas la belecon kaj la Sciencon; la "Kurierkolombo " kaj "Steloj sur la Paradizo", de klasika tendenco, rememoranta la infanecon kaj la junecon kaj ankaŭ la esperon kaj la doloron. Poste li donis novan tendencon al sia poezio al la manifesta - la memoraĵoj kaj tio, kio li konsideris esencan en la vivo - antaŭ ol estos la patoso kaj la nostalgio kiuj priokupas lin. Se en libroj kiel "La Panjo" estas la amo kiu influas lin, en aliaj verkoj estas la morto kiu superregas. Laste li publikigis "Pluvombrelo en Pikadilly" kaj "La tuta Beleco de l'Mondo."



MITOLOGIO DE L'ALTA NALONO

Ĵus oni eldonis libron titolitan "Alta Nalono. Rakontoj kaj Legendoj", kies origino, laŭ esprimo de la precipa respondeculo de la eldono, Germán Suárez Blanco (13), estas en la konkursoj organizitaj en la Instituto de Pola de Laviana dum la 1978ª jaro. La gelernantoj stimulitaj de la geprofesoroj (inter ili la citita respondeculo kaj la profesorino Gloriel Torre (14), kiu ankaŭ partoprenis en la ellaborado de l'libro), intervjuis gemaljunulojn el malsamaj lokoj, kiuj konis multenombrajn rakontojn kaj legendojn rilate la respektivajn lokojn aŭ pri la ĝenerala mitologio astura.

La citita libro atingis plenan sukceson, laŭ informas la regionaj ĵurnaloj. Pro tio mi gratulas la geaŭtorojn de tiu bela ideo, samtempe stimulante ilin daŭrigi tiun interesan taskon kulturan.



P R E C I Z I G O

La 7-an de la pasinta Novembro partoprenis en la programo "Renkontiĝo je la kvina", de la S.E.R., lerta sinjoro pri hindiaj aferoj, okaze de la 515ª datreveno de l'fondo de l'sekto de l'SIJS, kiu, en rilato al projekto de kunigo de l'precipaj religiaj kredoj por formi unu solan, asertis per ĉi tiuj aŭ similaj vortoj: "Projekto, kiu estis utopio, kiel estas Esperanto.

La lasta parto de tiu esprimo meritas la jenan precizigon: Oni konas, ke la aŭtoro de tiu aserto 1) Ne konas Esperanton; 2) ne partoprenis en esperantaj kongresoj, kaj 3) ne vojaĝis tra la tuta mondo sen alia lingvo ol Esperanto.

En kia ajn el la cititaj kazoj mi ne dubas, ke li rekonus ke Esperanto ne estas utopio sed viva realaĵo. Pro tio mi rekomendas al la aludita sinjoro kaj al ĉiuj, kiuj opinias kiel li, la lernadon, per aktiva praktiko, de la internacia lingvo Esperanto. Tio permesos al li posedi tiom utilegan lingvan instrumenton en la internaciaj rilatoj.



R I D E T O

Rideto malmulte kostas/kaj multe produktas. Ĝi ne malriĉigas kiun donas ĝin/kaj riĉigas kiun ricevas ĝin./Ĝi daŭras momenton/kaj eterne longdaŭras en la rememoro./ Ĝi estas ekstera signalo/de la profunda amikeco./Neniu estas tiel riĉa/ke li povas vivi sen ĝi/kaj neniu tiel malriĉa, ke li ne merita ĝin./Rideto mildigas la lacecon, renovigas la fortojn/kaj estas konsolo/sur la tristeco./Rideto havas valoron/de kiam oni ĝin donas./Se vi kredas, ke la rideto/nenion alportas al vi/estu malavara kaj donu la vian/ĉar neniu tiel/necesas l'rideton/, kiel tiu, kiu ne scias rideti. ANONIMO.
Tradukita de la revuo "Nueva Acrópolis". Gijón(15).



SUKCESO DE ASTURA SOPRANO

Fefi Arregui(16), soprano de Pola de Siero, denove partoprenis rondvojaĝo, ĉi tiun fojon, kiel figuro de la "Antologio de la Zarzuelo", de Jozefo Tamayo(17). Post multenombraj prezentadoj en Teksaso(USONO) ŝi kantis en Miami(USONO). Tuj poste ŝi prezentados en Israelo, por daŭrigi tra pluraj landoj en Eŭropo kaj Ameriko. Per opero kaj per la Hispana opereto la aktiveco de Fefi Arregui ne ĉesas, meritante la titolon de "La Astura Artistino la plej vojaĝanta".



NOTOJ:

10) Çelso Emilio Ferreiro (1914/1979). Prestiĝa poeto galega, kiu adoptis socian kompromison. Inter liaj verkoj estas citinda "Longa Stona Nokto", inkluzivita en "Antologio" kun verkoj de dudek galegaj aŭtoroj.

11) Nobelpremio aŭ Premio Nobel. Premio starigita de la sveda kemiisto Alfredo Nobel (1838/1896) inventinto de l' dinamito. La premio havas kvin partojn kun po 140.000 kronoj svedaj: Fiziko, Kemio, Medicino, Literaturo kaj Paco. Oni aljuĝas ĝin de 1901. Inter la premiitoj estas la hispanoj Santiago Ramón y Cajal (1904) kaj Severo Ochoa de Albornoz (1959), en medicino; José de Echegaraj (1906), Jacinto Benavente (1922), Juan Ramón Jiménez (1956) kaj Vicente Aleixandre (1977) en literaturo.

12) Jaroslav Seifert (1901/----). Kunfondinto kaj kunlaborinto de diversaj kulturaj gazetoj de sia lando (Ĉeĥoslovakio). Rekompencita en 1936, 1953, 1968 per la Nacia Premio de Literaturo kaj designita en 1966 Nacian Artiston. Li estas nekonata en Hispanio. Tamen oni preparas antologion de siaj verkoj, el kiuj aperis en la ĵurnaloj la poemo "La tuta beleco de l'Mondo".

13) Germán Suárez (----/----). Li naskiĝis en la provinco de Leono. Li studis en la Instituto de Astorga kaj en la Universitato de Oviedo, kie li faris kurson de "Romanika Filologio" kaj nuntempe li estas katedra profesoro de l'Instituto de Pola de Laviana (Asturio), kie li loĝas.

14) Mª Gloriel Torre (----/----). Ŝi naskiĝis en Moreda de Aller (Asturio). Ŝi studis en la Instituto de Sama de Langreo (Asturio), kaj poste ""Romanikan Filologion" en la Universitato de Oviedo. Nuntempe loĝas en Ciaño de Langreo (Asturio) kaj estas agracia Profesorino de l'Instituto de Pola de Laviana (Asturio).

15) "Nueva Acróopolis". Gazeto de neregula aperado eldonita de l'gijona sekcio de Kultura Asocio kun la sama nomo, kiu disponas je sekcioj en diversaj landaj kaj eksterlandaj urboj.

16) Fefi Arregui (----/----). Artista nomo de l'soprano María Josefa Arregui, posteulino de familio de prestiĝaj Instruistoj de Pola de Siero (Asturio). Ŝi studis en la Konservatorioj de Oviedo kaj Madrido kaj finis sian karieron kun la noto "bonege" kaj premio "fino de kariero". Dua premio de l'Konkursoj Internaciaj de Bolzano, Viotti, Emilia Vacelli, Sankta Vincenti kaj aliaj italaj urboj. En 1969 ŝi debutis en la Opero de Oviedo.

17) José Tamayo (----/----). Hispana direktoro de sceno nuntempa. Li fondis la grupon "Lope de Vega", kompanio konata nuntempe en la tuta mondo pro siaj prezentadoj en klasika arto. Inter ili, "Edipo", de Esĥilo, "La Verpermanĝo de l'Reĝo Belŝacaro" kaj "Sakramenta Aŭtodafeo", de Petro Calderón de la Barca. Nuntempe li estas direktoro de l'Hispana Teatro, de Madrido.



La Roma oratoro Cicero diris al unu homo, kiu diradis, ke lia edzino havas 30 jarojn: "Ĝi estas sendube vera, ĉar jam 10 jarojn mi aŭdas tion ĉi de vi". (J.Selnev, "El F.K.")

Niaj Geamikoj el....

....Bulgario

LA DOMO DE LA HUMURO KAJ SATIRO

La Domo de la humuro kaj satiro en Gabrovo (BULGARIO) estis fondita je la 1-a de Aprilo 1.972. La nomo "gabrovano" tie ĉi de unu jarcento elvokas multajn anekdotojn - simbolo de ŝparemeco, mensrapideco kaj sagaceco de homoj, kiuj scipovas "de nenio fari ion".

Sub la moto "La mondo savis sin, ĉar ĝi ridis", la Domo de - humuro kaj satiro kaŭzis grandan intereson en la lando kaj eksterlande. Proksimume 11.000 verkintoj kaj institucioj de 131 landoj per siaj 59.000 donacoj - artaj kaj muzeecaj valoraĵoj,transformis ĝin en universalan aferon. Je ĝia honoro la novinventita planedo je la 1-a de Aprilo 1.976 estis nomita "Gabrovo".Tiamaniere la pionira esenco kaj graveco de la ideo, la homa bezono de komunikado kaj intelekta perfektigado per la rido, transiris en internacian devon de organizantoj kaj kreintoj.

La Domo de humuro kaj satiro ampleksas preskaŭ ĉiujn specojn de arto - de la ŝerco, ironio, grotesko kaj sarkasmo ĝis la satiro, difinas ĝian multampleksan karakteron. La domo kolektas, konservas kaj science interpretas daŭran valoron de humuro kaj satiro kiel artan heredaĵon kaj nuntempeco, kreitan de la popoloj en diversaj specoj kaj ĝenroj de la arto: grafiko, pentroarto, skulptarto,literaturo, teatro kaj kinoarto, folkloro, etnografio, muziko, fotografio, filatelo maskeradoj kaj karnavaloj. Ĝi eldonas humurajn verkojn de bulgaraj kaj eksterlandaj aŭtoroj, posedas specialigitan bibliotekon pri ĉiuj humuraj ĝenroj.

En la kadro de sia agado la Domo organizas FESTIVALON de la humuro kaj satiro ĉiun duan jaron (en la nepara jaro) en Gabrovo dum la dua duono de monato Majo. La karnavala procesio vigligas la stratojn de la urbo. Oni organizas kvar konkursojn por artistoj de la tuta mondo - BIENALO de la karikaturo kaj de la malgranda humura skulptaĵo, BIENALO por pentraĵo, INTERNACIA KON-

KURSO "Foto-smjah" (foto-rido) kaj INTERNACIA KONKURSO por la literatura premio "Hitâr Petâr (Ruza Petro). Samtempe oni prezentas komikajn filmojn, spektaklojn de varietea teatro kaj popola humuro.

La Domo de humuro kaj satiro estas internacia centro, vaste malfermita por la aŭtoroj, artistoj kaj popoloj de la tuta mondo.

Per la internacia lingvo de la rido la Domo personigas la grandan ideon pri paco, interkompreniĝo, humanismo kaj morala perfekteco.

Gabrovo, 20.03.85 Verkis: Bojana Prodanova

....Ll sono

Traduko de "Kiom ili antaŭeniris ?"---"ESPERANTISTOJ DE NATICK LABORAS PRI SIA "ARMILO POR LA PACO""

de Harvey Simon, ĵurnalisto de la MIDDLESEX NEWS

Ne surpriziĝu se, promenante tra la Natick Mall (Butikejo) ĉiaŭtune, vi aŭdas malgrandan grupon da homoj, kiuj parolas lingvon, kiun vi ne povas identigi.

Ili parolas lingvon, kiu ne havas landan originon: Esperanto.

Kvankam ili aktuale forestas por somera ripozo, tiom, kiom ok membroj de la Esperanto-Societo de Novanglujo renkontiĝas ĉe la --Mall, ekde antaŭ tri jaroj, por konversacii per la "artefarita lingvo" kies centjaran jubileon oni festos en 1987.



FLORENCE MACK

La intereso pri Esperanto dum tiu tempo verŝajne grandiĝis, ĉar la membraro duobliĝis de 30 al 60, depost Aprilo, 1982, kiam la MIDDLESEX NEWS lastfoje skribis pri tiu grupo.

Loke, la Natick Mall grupeto kreskis mal pli impone, de kvin al ok, laŭ David Wolff, -redaktoro de la Esperanto-Societa novaĵletero, kiun oni sendas al proksimume 150 legantoj ĉiun monaton.

Ĉiaj homoj agadas (pri Esperanto), el aliaj landoj kaj kulturoj, kaj de multaj variaj interesoj, diris li, en telefon-intervjuo, el sia oficejo ĉe Wellesley College, kie li laboras kiel komputisto. Wolff, 29-jara, loĝas

en Framingham.

Li diris, ke Esperanton uzas ĝis 15 milionoj da homoj en proksimume cent landoj ĉirkaŭ la mondo.

Inter la lokaj parolantoj de Esperanto, eble estas pli ol kutime da komputistoj, kiujn allogas la lingvo pro sia logika strukturo.

Amatorojn de la scienc-fikcio ankaŭ allogis tiu lingvo, uzita en romanoj de Harry Harrison, kiu rakontas historion de tut-galaksia civilizacio bezonanta komunan komunikilon.

La lingvo elektita ? Esperanto, kompreneble.

Verkojn tiel varispecajn kiel la Biblio kaj Voltaire, oni jam tradukis Esperanten. La lingvon oni jam uzis en miloj da eldonaĵoj en certaj periodaj radio-dissendoj, en edukado, scienca esplorado kaj aliaj fakoj.

Esperanton kreis denaska polo Ludovic L. Zamenhof (1859-1917) kiel internacian "duan lingvon"kun la espero, ke ĝi servos kiel ponto inter la kulturoj kaj malintensigos la mond-streĉitecon.La vorto "esperanto" signifas "homo kiu esperas".

La lingvo, bazita sur la latina, estas facile lernebla, havante nur 16 bazajn gramatik-regulojn, neniujn malregulajn verbojn , kaj simplan vortaron, laŭ Florence Mack, kiu estas korespond-sekretariino de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto.

Sinjorino Mack loĝas en Natick kaj instruas fremdlingvojn ĉe Framingham South Mezlernejo.

Krom la uzado de Esperanto en scienc-fikcio, ekzistas pligrandiĝanta aro da originalaj verkoj, Mack diris en intervjuo ĉe sia Everett-strat-hejmo en Natick.

Sed Esperanto estas ne nur lingvo, sed lingvo kun celo: esti uzata tra la tuta mondo.

"Oni povas uzi ĝin por antaŭenigi la interkomprenon inter grupoj kaj landoj. Estas malfacile amikiĝi kun la homoj se oni ne povas paroli kun ili," diris Wolff.

"Esperanto," li diris, "estas pac-armilo."

Artikolo aperinta en la ĵurnalo "MIDDLESEX NEWS" la 22-07-1984

Tradukis kaj sendis: FLORENCE MACK



ANEKDOTO.- Unu advokato, tre malgranda, venis juĝejon, por defendi la aferon de sia kliento. Alia advokato, vidante lin, demandis, kiu li estas. Tiu respondis. Tiam la unua ekkriis: "Kio ? tia malgranda advokato ? mi ja povas vin kaŝi en mian poŝon !" "Vi povas", trankvile diris tiu "kaj tiam en via poŝo estos pli da saĝo ol en via kapo (M.Solovjev,"El Fundamenta Krestomatio")

KUIRANTE KUN PILAR

VIANDA RULAĴO

INGREDIENCOJ: 240 g. da bovhakitaĵo.
240 g. da porkhakitaĵo.
120 g. da pomoj senŝeligitaj kaj tranĉitaj
30 g. da butero
2 malfreŝaj pantranĉaĵoj.
Kelkaj olivoj senkermigitaj kaj pecetigitaj.
1 Ovo kirlita.
Iomete da lakto.
Salo kaj pipro.

Trempadu la pantranĉaĵoj en iomete da lakto.

Intermiksu la viandojn, pomojn, olivojn kaj pecetigitan panon. Salu kaj pipru.

Aldonu la ovon kaj miksu ĉion bone.

Formu longan platan rulon.

Varmigu la bakfornon, fandu la buteron en bakujo, enmetu la rulon kaj rostu dum 60 ĝis 90 minutoj je mezalta varmo.

Grasumu de tempo al tempo.

BONAN APETITON !


DISTRAĴOJ

Supo de literoj

```
O N O R K E O N
N I K L O O L O
A H O U N E R K
H I S I L A A R
O E U B Z I K A
J O Z E F O I T
L I C L I R N O
E N O M A D A S
```

[illegible] lando de literoj [illegible] vi-ajn [illegible]. [illegible] ili..
[illegible] la celo vi devas legi horizontale, vertikale kaj eĉ diagonale en ambaŭ direktoj sed ne transsaltu literojn.

KRADOENIGMO



HORIZONTALE :

1) Stilfiguro, konsistanta en la kunigo de du vortoj, kies sencoj ŝajnas kontraŭdiraj unu al la alia, por reliefigi neatenditan penson; ekz."lia silento estis elokventa". Elstara parto de fortikaĵo, en formo de neregula pentagono, aranĝita por ebligi la flankpafojn.
2) Flaveca ĝis ruĝeca tero, konsistanta el ferika-oksidhava argilo, uzata kiel pigmento por farboj. Amfibio senvosta. Manĝaĵo farita el Knedita, fermentita kaj bakita faruno.
3) Rivero,enfluanta en la Baltan maron. Tiu, kiu metie razas aŭ tondas barbon kaj kapharojn. Malfermi.
4) Nomo de la dudekdua litero de la latina alfabeto (Y,y) responda al la greka upsila,prononcata kiel i, kaj uzata i.a. kiel simbolo algebra por la dua nekonata kvanto. Uzurpa preno kaj tenado de loko, lando, ktp.

VERTIKALE:

A) Kastrita taŭro. Konfirmi sin al tio, kion alia persono ordonas aŭ malpermesas.
B) En la fabelo, giganto infanmanĝanta. C) Scienco kaj arto pri la akuŝado.
Ĉ) Oscilanta radeto, kunigita kun spirala risorto, en horloĝo.
D) Stato de animo, kiu ne estas maltrankviligata de zorgoj, timoj, ktp.
E) Longa kaj ofte larĝa japana zono el teksaĵo, uzata ĉe kimono; tiu de virino estas ofte ornamteksita aŭ brodita. Objekto de la penso; prezento de estaĵo aŭ afero en la spirito.


SOLVOJ AL LA ENIGMOJ APERINTAJ EN LA 43ª NUMERO DE "HELECO"

KRADOENIGMO:
HORIZONTALE:
A) Cirko.Kampo.Si[illegible]. B) Akompani. [illegible]. C) Koncerni.Kun[illegible]. Ĉ) [illegible]no.Trono.[illegible]ora.
VERTIKALE:
1) [illegible]. 2) [illegible]. 3) [illegible]. 4) [illegible].
SUPO DE LITEROJ.

```
O T A F N E R O
N O T E I N E G
A N T R E L M A
J I P A T R O J
B K O T R I V T
A E Z A I F E N
R L U S T E N A
C L K N O L A S
```

[illegible]: Mankas 21 kuboj
[illegible]: Frateco.
[illegible] VERKISTO:
Camilo José Cela.

PROMENO TRA LA PARKO



Jen estas plano de Parko. Iu promenanto eniras en ĝi per A kaj eliras per B, post trairi ĉiujn vojojn nur po unu fojon kvankam, kompreneble, okaze, li devas reiri en la saman deirpunkton. Kiu estis lia trairo ?

Iu fiŝkaptisto trovis ene de botelo, la ĉi-apudan malnovan pergamenon kun teksto en kiu estis forviŝitaj pro la forpaso de la tempo, diversajn literojn. Ĉu vi kapablas rekonstrui la mesaĝon ?

PERGAMENO

Vivu,pr g'esu,sed l rri ne ^esi.